UEA-MEMBRECOJ por 1950: EANA estas la oficiala land-asocio de UEA en Usono kaj Kanado. Ĉiu membro de EANA aŭtomate fariĝas Asocia Membro de UEA. Sed por aldona partopreno, aliĝu al UEA kiel *individua* membro: MJ (kun jarlibro) \$1; MA (jarlibro kaj gazeto) \$2.50. Sendu vian UEA-kotizon por 1950 pere de la Centra Oficejo de EANA.

REABONOJ AL ESPO-GAZETOJ: Kiam vi sendas reabonojn por eksterlandaj gazetoj, sendu ĉiam pere de la Centra Oficejo de EANA. Tiel vi helpas al vi mem kaj ankaŭ multe helpas al via land-asocio! Jen kelkaj por via elekto: *Scienca Revuo* \$2; *Voĉo de Islando* \$.75; *Heroldo* \$4; *La Juna Vivo* \$1.25; *La Espero* (Sweden) \$1.50; *Malgranda Revuo* (6 numeroj) \$1.20.

ELEKTRO-TEKNIKA VORTARO: La Komisiono pri tiu scienco nun studas la eblecon re-eldoni, per foto-presado, tiun valoran fak-libron. Terminoj en franca, angla, germana, itala, hispana, Esperanta. Por certigi presadon sendu mendon al Centra Oficejo de EANA *nun*. Ni prizorgos la aferon kaj informos vin poste pri la preciza kosto.

KION NI MANĜU ?

W. SOLZBACHER

(*Amuza studo pri vortoriginoj en Esperanto*)

Kiel la nomoj de niaj vestoj, tiel ankaŭ la nomoj de niaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj montras, ke nia civilizo estas tutmonda. Ĉiuj kontinentoj alportis novajn vortojn al la lingvoj de Okcidenta Eŭropo kaj tiel al Esperanto.

La indianoj de Norda, Centra kaj Suda Ameriko pliriĉigis la civilizitan mondon per multaj gravaj vortoj, ekz. *maizo*, *tomato*, *kakao*, *ĉokolado*, *tapioko*, *manioko*, *kasavo*. Kiom da bongustaj fruktoj havas indianajn nomojn! La suka *ananaso*, la dolĉa *papajo*, la acide-dolĉa *guavo*, kies gelatenaĵo estas ŝatata frandaĵo, la aromriĉa *persimono*, la *avokado*, el kiu oni faras bonon salaton, estas fruktoj de la Nova Mondo kaj pruvas tion per siaj nomoj. *Tabako* kaj *rumo*, kvankam ili ne estas manĝaĵoj, eble ankaŭ meritas mencion ĉi tie.

Multaj fruktoj indikas originon per siaj nomoj. *Persiko* kompreneble venas el Persujo, *ĉerizo* el la regiono de Cerasus, en Azio, *cidonio* de Cydonia, en la Insulo Kreta, *kaŝtano* de Kastana, ĉe la Nigra Maro. *Banano* estas afrika, *juĵubo* araba, *mango* malaja. *Melono* estas greka, *abrikoto* araba, *pomo*, *piro* kaj *nuksa* latinaj vortoj. *Pruno* estas greka. *Suko* estas sanskrita (hinda), *sukero* kaj *siropo* estas arabaj vortoj.

Oranĝo estas araba, *pampelmo* malaja, *kumkvato* ĉina, *mandarino* sanskrita, *limedo* persa, *bergamoto* turka, kaj, *citrono* greka vorto. Ŝajnas do, ke ĉiu el la citrus-fruktoj havas alilingvan originon. La Esperanto-vortaroj estas sufiĉe konfuzaj pri la nomoj de tiuj fruktoj. Nur *oranĝo* kaj *citrono* estas oficialaj vortoj, *bergamoto* estas Zamenhofa, *mandarino* troviĝas en Plena Vortaro, *pampelmo* kaj *limedo* en Edinburgh-Vortaro, *kumkvato* nenie. Tial jen listo kun la botanikaj terminoj (latinaj) kaj la anglaj tradukoj:

(*Vidu tabelon je sekvonta paĝo.*)

AMERIKA ESPERANTISTO

pampelmo	Citrus decumana	grapefruit
oranĝo	Citrus sinensis	orange
bergamoto	Citrus bergamia	bergamot
mandarino	Citrus nobilis	tangerine
citrono	Citrus medica	lemon
limedo	Citrus limetta	lime
kumkvato	Citrus aurantium	kumquat

Rizo estas sanskrita, *spinaco* persa, *saguo* papua kaj mal-aja, *cepo* kaj *fabo* latinaj, *pizo* kaj *petroselo* grekaj vortoj. *Pudingo* estas kelta (gaela-irlanda). *Pipro* kaj *zingibro* estas sanskritaj, *cinamo* hebrea, *mento* kaj *timiano* grekaj.

El la baska lingvo venas *anĉovo* (*anchuva*, "seka"), el la islanda lingvo *haringo*. *Sardinoj* kaj *sardeloj* estis unue kaptitaj ĉe la Insulo Sardinio.

Ni finu per kelkaj rimarkoj pri trinkaĵoj. *Kafo* estas araba kaj turka vorto, *teo* venas el la ĉina lingvo, *kolao* estas afrikdevena, *lakto* greka, *kremo* latina. Kvankam la Profeto Mahometo malpermesis al siaj anoj la trinkadon de alkoholo, la araba lingvo donis al ni la vortojn *alkobolo* kaj *arako*. *Julepo* estas persa vorto, kaj ĝia unua signifo estis rozakvo. *Rumo* estas amerik-indiana vorto. La latina origino de *likvoro* estas evidenta. *Vino* estas de greka, *biero* de germana origino. *Brando* ankaŭ estas germana ("brulita" vino), kaj *ĝino* estas mallongigo de juniperbrando. *Grogo* venas de la ŝercnomo de la brita admiralo Vernon, kiu vivis antaŭ 200 jaroj; *viskio* venas el la gaela lingvo (*uisge-beatha*, "viv-akvo").

AVERTO PRI LA ADRESARO "KIU ESTAS KIU"

La land-asocio *Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko* deziras, averti ĉiujn Esperanto-organizaĵojn tra la mondo, ke *EANA* ne respondecas en iu ajn maniero pri la adresaro *Kiu estas Kiu inter Nord-Amerikaj Esperantistoj*. Tiu adresaro estis, kaj estas, la privata entrepreno de S-ro F. A. Postnikov ("Espero"), en Arkansaso, Usono.

LETEROJ DE ZAMENHOF

(*Recenzo pri grava libro.*)

Leteroj de L. L. Zamenhof. La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Prezentado kaj komentado de Prof. G. Waringhien. Vol. I, 1901-1906. Paris, 1948, 370 pp. Ricevebla de EANA. Bind. \$3.35, afrankite.

En la jaro 1929 multaj leteroj de Zamenhof aperis en la *Originala Verkaro*, kune kun gazetartikoloj, paroladoj, poemoj, antaŭparoloj kaj aliaj originalaj verkoj de la aŭtoro de nia lingvo. Tamen en la *Originala Verkaro* (tiu ĉefverko nun estas denove havebla de la libro-servo de EANA, \$5.00) la letera parto estis tre nekompleta. Preskaŭ tute mankis la ampleksa kaj gravega korespondo kun la francaj "eminentuloj": de Beaufront, Bourlet, Michaux, Bréton, Boirac, Sébert, Javal, ktp. La kaŭzo sendube estis, ke en 1929 la konfliktoj estis ankoraŭ tro freŝaj kaj kelkaj el la personoj rekte envolvitaj ankoraŭ vivis. Tamen post la dua mondmilito Profesoro Gaston Waringhien, Membro de la Esperanto-Akademio, sukcesis trovi kaj kopii multajn leterojn ĝis nun tute ne konitajn. Li aranĝis ilin en du volumoj, aldonante trafajn kaj utilajn komentojn.

La unua volumo de la *Leteroj* (la duan mi ankoraŭ ne vidis) estas streĉe interesa kaj profunde pensiga. Ĝi detruas "legendojn" kaj helpas nin, vidi en tute nova lumo la homan problemon de Zamenhof kaj diversajn gravajn faktojn el la historio de Esperanto.

Laŭ mia opinio la ĉapitro pri la rilatoj de D-ro Zamenhof kun D-ro Javal estas la plej signifoplena. Oni jam sciis, ke D-ro Javal, famkonata sciencisto, influhava politikisto kaj riĉulo, favoris "reformojn" en la gramatiko kaj vortaro de Esperanto. Kune kun Generalo Sébert li fondis kaj financis la Esperantistan Centran Oficejon en Paris. Poste li proponis al D-ro Zamenhof sumon da mono (laŭdire 250,000 frankoj, proksimume 50,000 dolaroj, veve multe da mono

en 1906!), kiu permesus al li dediĉi sian tutan tempon al Esperanto sen financaj zorgoj — kondiĉe, ke li reformu la lingvon laŭ la ideoj de Javal. Zamenhof, kies financa situacio tute ne estis brila, konsideris la proponon dum iom da tempo, sed fine malakceptis, ĉar “mi tre timas, ke tiam mi perdos tion, kio estas por mi la plej kara kaj plej necesa — mian moralan sendependecon.”

Ĝis nun oni ne konis la profundan tragedion malantaŭ tiu afero, en kiu la monpropono estis multe malpli grava ol alia fakto: D-ro Javal estis unu el la du “ eminentuloj ”, kiuj estis fariĝintaj intimaj personaj amikoj de Zamenhof. La alia estis Michaux. Javal kaj Michaux estis ankaŭ la solaj eminentuloj, kiuj serioze konsideris la Zamenhofan ideon pri “ homaranismo ” kaj la kreado de “ popolo neŭtralehoma ”. La aliaj konsideris tiun ideon stranga kaj eĉ danĝera. La propono, ke oni diru “ Varsovilando ” por Polujo, “ Peterburgregno ” por Rusujo, “ Parizregno ” por Francujo, kaj ke oni konstruu templojn por ideologio parte religia, parte filozofia kaj parte politika, kiu nomiĝus Hilelismo aŭ Homaranismo, ŝajnis al ili neserioza, fantazia, preskaŭ freneza. Fakte oni povas plene kompreni la Zamenhofajn ideojn tiurilatajn, nur se oni konas la tiaman situacion en Orienta Eŭropo kaj la personajn spertojn de Zamenhof.

Kvankam D-ro Zamenhof ofte *diris*, ke la ideo de Homaranismo estas al li pli grava ol Esperanto, li ne *agis* laŭ tiuj vortoj en la Javal-afero. Li rifuzis endanĝerigi Esperanton, kvankam li sciis, ke tiu sinteno riskas mortigi la simpatiojn de persono, kiu laŭ lia opinio povus multe helpi la laboron por Homaranismo. En tiu momento — en tragedia batalo interna — la praktika homo Zamenhof, la respondeca iniciatinto de Esperanto, venkis la revulon Zamenhof.

Tiu duobla naturo de Zamenhof aperas ofte kaj klare en la *Leteroj*. Unuflanke li estis idealisto plena de kompatato por ĉiuj, kiuj suferas, kaj revanta pri nova ordo de la homaro, sen naciaj, rasaj kaj religiaj antagonismoj. Li estis elpensinta tutan sistemon de ideoj pri tiu transformado de la mondo.

AMERIKA ESPERANTISTO

Aliflanke li estis realisto kun miriga lerteco pri praktikaj strategio kaj taktiko kaj kun profunda kono de la homa psikologio. Falinte inter la francajn eminentulojn, kiuj batalis inter si kaj el kiuj ĉiu estis ĵaluza kontraŭ ĉiu alia, li bezonis apenaŭ mallongan rigardon por ĝuste taksi ilin kaj scii kiamaniere uzi ĉies talenton kaj ambicion por la bono de Esperanto. Ofte li skribis, ke li estas "tute sensperta" pri tio aŭ ĉi tio. Kelkajn semajnojn poste li jam estis akirinta la "spertojn" kaj sciis precize kiamaniere solvi la problemon. En la *Leteroj* tiu modesta kaj preskaŭ timema kuracisto el Varsovio aperas kiel pensulo multe pli profunda kaj samtempe kiel realiganto multe pli realista ol kelkaj el la eminentuloj famkonataj en scienco, politiko kaj "bona societo".

Cetere legantoj devus esti singardaj, ke ili ne troigu la disputemon, ĵaluzecon, vantecon kaj personan ambicion de tiuj eminentuloj. En konfidenca korespondado oni ĝenerale parolas pli multe pri malagrablajoj kaj aferoj, kiuj *ne* funkcias bone, ol pri sukcesaj entreprenoj kaj harmonia kunlaboro. Pri tiaj aferoj oni ja povas skribi publike en la gazetoj.

Krom la malvirtoj kaj eraroj de la eminentuloj la *Leteroj* ankaŭ montras iliajn nekontestablajn meritojn. Sen Carlo Bourlet, kiu havigis al Zamenhof pagon por liaj libroj kaj artikoloj, la Majstro ne estus povinta fari siajn klasikajn tradukojn kaj ĉeesti Kongresojn. Sen Generalo Sébert kaj Rektoro Boirac la Esperanto-movado estus riskinta perei inter la manoj de senspertaj amatoroj. Eĉ Beaufront, kies rimarkoj ofte ŝajnas treege trafaj, aperas en pli favora lumo post legado de la *Leteroj*. Unu el la plej simpatiaj personoj en la *Leteroj* estas Michaux, la organizinto de la Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer. Aliflanke Bréton, de la Eldonejo Hachette, aperas kiel la plej nigra ŝafo. Tamen estas evidente, ke la amaraj sentoj de Zamenhof pri Bréton estis parte rezulto de la fakto, ke Zamenhof malbone komprenis la komercajn praktikojn de grandaj eldonistoj. La agmaniero de Bréton ofte estis riproĉinda. Tamen oni ankaŭ

devas konsideri, ke li ne estis riĉulo elspezanta sian propran monon, sed oficisto de granda kaj iomete burokrata firmo, kiu investis multe da mono en riska entrepreno, esperante, ke tio poste alportos al ĝi grandan profiton. La *Leteroj* ne montras al ni, kiel malfacila estis la tasko de Bréton, konvinki la aliajn estrojn de Hachette, ke la Esperanto-fako povos fariĝi grava kaj profitdona. Juĝante la tutan epizodon de ĝenerala vidpunkto, ne atentante individuajn kritikindaĵojn, oni sendube devas konkludi, ke Hachette multe helpis la progreson de Esperanto.

Profesoro Waringhien aranĝis kaj komentis la *Leterojn* kun admirinda klareco kaj preskaŭ absoluta senpartieco. Se enestas iom da persona antaŭjuĝo, ĝi estas kontraŭ Profesoro Cart, kiun li ŝajne tute ne ŝatis.

S-ro Waringhien prave korektis evidentajn gramatikajn kaj skribajn erarojn. Sed li iomete troigis tiun rolon, trudante siajn proprajn ideojn pri gramatiko kaj stilo. En kelkaj kazoj li vere tro kaprice ŝanĝis *-ata* al *-ita* kaj reciproke, *iri renkonten* al *iri renkonte*, *vi pensas necese* al *vi opinias necesa*. Laŭ mia opinio kompilanto ne devus esti cenzuristo. Anstataŭ "korekti" la stilon de Zamenhof kaj Boirac, Waringhien estus povinta korekti kelkajn el siaj propraj eraroj, ekz. *el la sola Francio* (anst. *sole el Francujo*) kaj *bierglaso* (anst. *glaso da biero*) Laŭ la *Plena Vortaro*, de kiu li estas unu el la aŭtoroj, *riveli* estas fotografia faka esprimo, ne sinonimo de *malkaŝi*.

La preso de la libro estas bona, la papero ne tro malbona, la bindo malbela, kaj la preso sur la bindo abomena. Bedaŭrinde do la eksterajo ne estas inda de la enhavo kaj estas neniel komparebla al tiu de la *Originala Verkaro*. La verko mem estas treege grava, profunde instrua kaj intense interesa.

—W. S.

NOTU: La dua volumo de *Leteroj* alvenis al ni post ĉi tiu recenzo. *Leteroj II* estas pli bone bindita ol *Leteroj I*. Mendu ilin de EANA, ĉiu volumo \$3.35, la du volumoj kune \$6.50.

LANDO KIE ESPERANTO ESTAS OFICIALA

RAPORTO DE LA ZENDIA ESPERANTO-KLUBO

La Zendia Esperanto-Klubo estas formita pasintjare en Vaŝingtono, D.K. Ĝi konsistas el kelkaj da instruistoj kiuj laboradas ĉe la Lernejo de la *Army Security Agency*. La nomo de la klubo estas prenita el tiu de fiktiva insulego "Zendio", ĉirkaŭ 3000 kilometroj malproksime de Peruo, en la Pacifika Oceano. Ĉi tiu kontinento, preskaŭ triono de la grandeco de Aŭstralio, rilatas al unu el la problemoj en ilia lecionaro. Ili jam intencas uzi la interlingvon en la Zendia problemo, kiun la militistaj lernantoj de la lernejo plenumos. Tamen, ĉi tio ne signifas ke la uzo de Esperanto havas oficialan sankcion Armean.

En la "*Mallonga Ekonomia Historio de Zendio*", oni povus legi:

"LINGVO. Esperanto estas la oficiala lingvo, kvankam oni parolas hispane, portugale, kaj diversajn dialektojn indianajn. En la havenoj kaj pli grandaj urboj, la angla estas komuna lingvo."

La aŭtoroj de la problemo bezonis neŭtralan oficialan lingvon por la "Zendianoj", kaj samtempe ili vidis la oportunon lerni alian lingvon ol tiuj, kiujn ili jam konis. Plie, per la problemo, ili esperas kreskigi intereson ĉe la lernantoj pri la temo de interlingvo (ĝenerale), kaj Esperanto (precipe)!

La naskiginto de la klubo estas *S-ro Lambros D. Callimabos*, antaŭtempa flut-solisto ja bonkonata same en Eŭropo kiel en Usono. Lia intereso pri Esperanto komencis en Eŭropo en 1935. Li gvidadas la membrojn, kaj bone instruadas ilin en la lernado de la lingvo. La ĝenerala (kaj korespondanta) sekretario estas *S-ro Richmond D. Snow*.

La celoj de la klub-membroj estas du: (1) akiri fluparolon je ili mem; kaj (2) interesigi aliajn personojn pri la potenca valoro de funkcia interlingvo.

—*Richmond D. Snow.*

NOVA ASTRO INTER VERDAJ STELOJ

SOMERA UNIVERSITATO — 1948

RECENZO: "Somera Universitato — Malmö 1948." Eldonita por U.E.A. de *The Esperanto Publishing Co.* 7" x 5". 108 paĝ. kart. prezo 75c afrankite (havebla ĉe EANA).

Enhavo: Enkonduko; La laponoj kiel kultura popolo; La kimraj artfestoj; El mirinda naturo; Astronomiaj sensacioj; Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro; El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj; La kalevala kulturo; Pri la sveda kooperativa movado; Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro.

La leganto atendas universitatnivelan pritrakton de la temoj kaj vere plimulto de la prelegistoj sukcesis altnivele popularigi profunde sciencajn temojn, tenante la leganton en streĉa interesiĝo.

Bedaŭrinde ni ne povas diri tion pri la prelego de d-ro Lapenna, kiu kaptis la okazon propagandi sian materialiste-komunistan doktrinon en maniero bone konata en certa lando. La prelegisto ne pritraktis la temon objektiv-science, sed per sofismoj, primokoj kaj intence malĝustaj komentoj "disbatis" la fundamenton de nuntempa juro kaj aŭtoritate donis por la kredo kaj konfeso sian koncepton pri la juro. Ne estas loko ĉi tie detale pritrakti la prelegon por pruvi ĝian "sciencecon". Kritika kaj morale sana leganto mem eltrovos la tendencon de tiu prelego kaj kaŝitan en ĝi kanibalan moralon ("malbono estas, se la frato manĝos min, kaj la bono, se mi manĝos la fraton"). Ĉiuj penadoj de pacemaj landoj kaj homoj de bona volo por certigi al homaro la eternan pacon, malsukcesas ĝuste pro tio, ke unu grandpotenco aplikas en internaciaj rilatoj (ni ne diras jam en sia lando) kanibalan moralon.

Ni nur bedaŭras, ke UEA fariĝis la tribunalo de tiuspeca "scienco", kaj permesis al d-ro Lapenna politikan agitadon dum la Universala Kongreso. Eldonante la prelegojn dum la Somera Universitato per aparta libro, pri la prelego de d-ro Lapenna, UEA ne donis iun ajn komenton aŭ sintenon al ideoj, propagandataj dum la oficiala aranĝo de Kongreso. Nur en piednoto oni kuraĝis rimarki, ke prelegisto *permesis* uzi sufikson "ujo" anstataŭ "io". Tiu grandanima cedo de prelegisto certe valoras por kontrabande enkonduki en la oficialan eldonaĵon de UEA, ruinigajn por ĉiu socio materialistajn ideojn.

La lingvo ĉe diversaj aŭtoroj estas diversa, ĝenerale korekta kaj zorgeme polurigita, sed en la libro troviĝas multaj preseraroj.

Por kritika leganto la libron ni rekomendas.

—Myron Mychajliw

AMIKO MALJUNA, MALNOVA, FORPASIS

John Wilbur Wood multmaniere servis al Esperanto dum sia vivo. Amiko de ni ĉiuj, li estis plej intima amiko de *Dan Ward Gibson*, kiu skribis ĉi tiun nekrologon.

Mortis la 22an de Aŭgusto, *John Wilbur Wood*, 80-jara, Esperantisto de 1907, ĉe la Masonic Home (Framasona Hejmo) en Zenith, apud Tacoma, en la ŝtato Washington, Usono.

Profesie, S-ro Wood estis presisto. Li administris, dum multaj jaroj en Tacoma, sian propran komercan presejon, kiun li nomis "Acorn Press" (Presejo Glano). Ĝi estis vaste konata pro la bonkvalito kaj arteco de siaj produktaĵoj. Foje, li laboris ĉe tri ĵurnaloj en urboj de Washington-ŝtato, kiel direktoro de presa fako, kompostisto kaj linotipisto.

Li estis entuziasma Esperantisto, vigle interesata pri la progreso de la movado, kaj malgraŭ la malgrandeco de siaj monrimedoj en siaj lastaj jaroj, li daŭrigis ĝis la morto, siajn kontribuadojn al la Subtena Kaso de EANA. Dum tiuj malagemaj jaroj, Esperanto estis por li granda konsolo. Li korespondis ĝis sia morto kun kelkaj, pere de Esperanto trovitaj amikoj en diversaj landoj. Pro ĉi tiuj, speciale, ni petas ke Esperanto-ĵurnaloj diverslandaj bonvolu enmeti, inter siaj nekrologoj, kelkajn vortojn pri la forpaso de S-ro Wood.

Adiaŭ, bona amiko!

—D. W. G.

NIAJ MORTINTOJ: En Meksiko, mortis *Kolonelo Fernando Redondo*, 66-jara, meritplena tradukinto de klasika hispana poezio, aŭtoro de "Provo pri Idearo" (Vortaro pri kunrilataj ideoj), kiu estis en presado, kiam la hispana milito eksplodis. — En Ashland, Ohio, *George B. Wrenn*, longtempa Patrono-Membro kaj subtenanto de EANA, plej fidela kaj lojala samideano. — En Minneapolis, Minn., *Profesoro Henry L. Woltman*, kiu ĉiam amis Esperanton super ĉiuj lingvoj.

KANADA INFORMO

G. Clayton, Galt, Ontario, bone konata Esperantisto kaj membro de la Estraro de EANA, raportis pri interesa edziĝa festo en kiu li partoprenis kiel la "fiera patro". Li skribis: "Tiun tagon, proksimume 50 bienistoj kun edzinoj kaj infanoj venis al la bieno de mia filino por gratuli la novan paron kaj por porti amason da donacoj. Mi deĵoris je la piano, kaj ludis por dancado ĝis mi preskaŭ defalis de la seĝo pro laciĝo. Poste iu bienisto menciis pri nia malgranda Esperanto-grupo en Galt. Baldaŭ la tuta aro grupiĝis ĉirkaŭ mi, kaj dum ili manĝis sur la herbejo mi prelegis kaj demonstraciis pri Esperanto dum duonhoro." Ĉu nova modelo por estontaj edziĝaj festoj? Espereble!

R. C. Palmer, de Manitoba, dumsomere vizitis en San Diego, Kalifornio. Li skribis al la Centra Oficejo: "Mi tre ĝuas la libertempon ĉi tie. Estas mirinda lando. Certe ankaŭ vi refreŝiĝos, se vi vizitos ĉi tie dum iom da tempo." Kaj feliĉe tion ni ja faris poste!

Dez. Hackett, lerta sekretario de la Toronto Kongreso de EANA en 1948, edziĝis en Septembro ĉi-jaron. Ĉiuj sendas "Koran gratulon!" S-ro Hackett nun loĝas iom ekster la urbo Toronto, nun Lansing; sed li regule partoprenas kaj prizorgas aferojn de la Toronto-Klubo.

Cameron Macdonald, Fort William, Ontario, prezentis paroladojn pri Esperanto al Rotario-Klubo kaj Kiwanis-Klubo en Julio. Post tiuj paroladoj aperis du longaj artikoloj pri Esperanto en la lokaj ĵurnaloj.

Toronto Esperanto-Klubo komencis sian regulan programon en Oktobro. Elektiĝis kiel novaj estroj: *Jerry Lambert*, Prezidanto; *Robert Kelly*, Vic-Prezidanto; *Dez. Hackett*, Sekretario-Kasisto. La monata Bulteno de la Klubo denove aperas. Ni bedaŭras legi, ke *Fino Olive Latimer* forlasas Toronton kaj intencas iri al Meksiko por loĝi. Sed Meksiko gajnos fidelan Esperantistinon!

ESPERANTO-KRONIKO

Bonaj recenzoj pri la libro "Esperanto: The World Inter-language" aperis lastatempe en "La Revuo Orienta" (de Naokazu Kawasaki), "Aŭstria Esperanto-Revuo" (de Walter Mudrak), "La Rondo" (de F. R. Banham), "The British Esperantist" (de J.C. Rapley) kaj "Heroldo de Esperanto" (de Teo Jung). S-ano Mudrak menciis, ke "la verko jam tre utile servis al D-ro M. Fuehring, direktoro de la Aŭstria Ŝtata Ekzamen-Komisiono por Esperanto, kaj al Kortega Konsilisto D-ro F. Wollmann por verkado en la sfero de pedagogio".

Socikredito—Mallonga Klarigo (en Esperanto) estas havebla senpage de F-ino Muriel Stewart, Social Credit Coordinating Committee, Gordon House, Carrington Street, Nottingham, Anglujo.

Semajna Esperanto-artikolo, ofte ilustrita, aperas en "A Republica", plej grava kaj malnova gazeto en la brazila ŝtato Rio Grande do Norte. Gratulleteroj al la direktoro de tiu gazeto estus tre utilaj por certigi daŭrigon de la rubriko. Skribontoj ricevos ekzempleron de la gazeto. Skribu pere de la aŭtoro de la Esperanto-artikoloj, Arlindo Castor de Lima, Rua Pte. Passos 566, Natal, Rio Grande do Norte, Brazilo. Sendu leteron baldaŭ.

Fotograf-Poŝtmarkoj por la Festsezono, kaj Korespondado! Ni povas fari ilin por vi kaj la viaj. Via foto en poŝtmarkgrandeco, kiun vi povas alglui al leteroj, salutkartoj, anoncoj, ktp., 100 por \$2.00. Petu informon de: *Joseph Leaby*, 1754 Lanier Place, N. W., Washington, D. C.

"*La Nokto Antaŭkristnaska*" estas traduko de la fama angla poemo "The Night Before Christmas", kiun faris S-ro *Milton Davis*, de Sanatarium, Kalifornio. Jen peceto, kiu montras la bonecon de la traduko:

Mi aŭdis lin krei ĵus antaŭ forlasi la lokon:
"Nun Ĝojan Kristnaskon al ĉiuj!" kaj plu "Bonan Nokton!"

ESPERANTO-KRONIKO

Rio de Janeiro nun havas Couto-Fernandes-Straton honore al la famkonata Esperanto-pioniro Alberto Couto Fernandes, multjara Prezidinto de Brazila Esperanto-Ligo.

Grava katolika semajna revuo, "The Commonweal", New York, enhavis artikolon de D-ro W. Solzbacher pri Esperanto la 24an de Junio 1949.

Religiaj himnoj en Esperanto ŝajnas esti treege ŝatataj, ĉar preskaŭ samtempe aperis dum la pasintaj semajnoj *Evangelia Kantareto* en Svedujo, *Liberala Himnaro* en Anglujo, kaj *Himno de Katolikaj Esperantistoj* en Italujo. La du plej grandaj himnolibroj en nia lingvo, *Himnaro Esperanta* de Montagu C. Butler, kaj *Espero Internacia* de Ann E. Beatty, ankoraŭ estas haveblaj de EANA.

La Supera Konsilantaro de Framasonoj en Brazilo decidis, ke estonte ĝiaj pasportoj estos presataj en brazila (portugala) lingvo kaj Esperanto.

Internacia Katolika Esperanto-Kongreso okazos en Romo 10-17 Aŭgusto 1950. Adreso: P. Modesto Carolfi, O.F.M., Via Merulana 124b, Roma, Italujo.

De la Svisa Radio ni ricevis ilustritan programlibron kun anglalingva kovrilo, "Switzerland Calling". Ĝi ankaŭ enhavas la mallongondajn programojn en Esperanto. Marde parolas dufoje en Esperanto *D-ro A. Baur*, ĵaude, ankaŭ dufoje, *D-ro Edmond Privat*. Petu la programlibron de Swiss Short-wave Service, 28 Neuengasse, Bern, Svisujo.

Televiĉ-programoj pri Esperanto okazis en Britujo dum la Universala Kongreso en Bournemouth kaj la Antaŭkongreso en London. En London "aktorin" D-rino Wanda Zamenhof, S-ro Chan Yeh (el Ĉinujo), S-ro Tadros Megalli (el Egipto), F-ino Inga-Maj Adamsson (el Svedujo) kaj S-ro Mearns (el Skotlando), en Bournemouth S-ino Strönne (el Svedujo) kaj S-roj Megalli kaj Yeh.

ESPERANTO-KRONIKO

Charles H. Briggs estas bone konata kaj multe amata en Esperantolando, pro la longa, senlaca laboro por Esperanto. Antaŭ kelkaj monatoj, tiu pioniro, samideano Briggs, suferis kor-atakon. Feliĉe li nun pli kaj pli refortiĝas. Ĝus antaŭ sia malsaniĝo, li sendis al la Centra Oficejo de EANA tre interesan manuskripton en kiu estas kolektego de atestoj de proksimume 170 personoj pri la valoro kaj utilo de Esperanto al ili. Li komencis tiun kolektadon en la jaro 1932, kaj la spertoj de multaj Esperantistoj, nun bone konataj tra la mondo, respeguliĝas en tiuj paĝoj. Ni planas presadon de ekzemploj el tiu fonto de inspiro. Ni dankas al S-ro Briggs, kaj ni deziras al nia amiko rapidan kaj konstantan resaniĝon.

Speciale sendita artikolo estis en la "New York Times" (Septembro) kiu rakontis pri S-ro *Cipriano Ferraris*, New York, kaj lia lerta enigmo de "magiaj kvadratoj". Li prezentis tiun enigmon al kongreso de la Amerika Kriptogram-Asocio. Je la fino de la enigmo estas citaĵo en Esperanto. Gratulon!

Mark Starr, Ĉefo de la Usona Delegitaro al UNESCO-Konferenco, raportis: "Post multe da miskompreno kaj malŝparo de tempo pro lingva diverseco ĉe Eduka Konferenco UNESCO en Elsinore, Danlando, Junio, 1949, mi tre feliĉe partoprenis en alia konferenco en Viskadalen Altlernejo, Svedlando. Tie mi aŭdis multajn prelegojn pri la svedaj kooperativo, labor-sindikatoj, politikaj aferoj, kaj sociaj temoj kaj problemoj. Paroladoj kaj diskutoj konvene okazis nur en *Esperanto*. Mian proponon, ke UNESCO starigu (post anonco de unu jaro) instituton uzantan nur unu lingvon (Esperanto) por diskuti la teknikon kaj enhavon de edukado por plenaĝuloj, la Konferenco en Elsinore akceptis nur provizore kaj sen diskuto pri ebla studado de elektota konsil-komitato."

DEZIRAS KORESPONDI

- Austrio.* H. Wyhart, Reichsapfelgasse 17/6, *Wien XV/101.* Kor.
Azoroj. H. T. Gomes de Freitas, *Airport de Santa Maria.* Kor.
Brazilo. Ilka Figueria, Rua Joao Batista 55, *Barra do Pirai.*
Bulgarujo. T. S. Artinov, Str. Stalin Nr. 96 A., *Sliven.* PM.
Bulgarujo. D. Kančev, M. T. C., *Sliven.* PM., il PK.
Ĉekoslovakujo. J. Gottfried, Tiche nam. 8., *Trebič-Zamosti.* Kor.
Ĉekoslovakujo. O. Kulaga, *Háj u Opavy.* Kor.
Ĉekoslovakujo. J. M. Mazánek, Zapadni 4., Dusikarny, *Ostrava.* PM.
Ĉekoslovakujo. J. Studenka, *Mikulov na Morave.* Kor., il PK., PM.
Ĉekoslovakujo. J. Fucik, Masarykova 724., *Jemnice.* Kor.
Ĉekoslovakujo. J. Dočekal, *Drabotuse,* Morava. Kor., il PK., PM.
Ĉekoslovakujo. V. Basta, Kremencova 21., *Praha II.* Kor.
Finlando. Nurmio Tauno, *Metsakansa.* Kor.
Francujo. F. Depreux, 8 rue Pargaminieres, *Toulouse (H. G.)*
Francujo. J. Roux, 31bis, Av. Victor Hugo, *Apt. (Vaucluse).*
Germanujo. P. Bünemann, (24a) *Aumühle, Bez. Hamburg.* Kor.
Germanujo. H. Nothvogel, Dangersstr. 1., *Hannover-Herrenhausen.*
Germanujo. E. Seithel, Schlossgasse 21., (13a) *Aschaffenburg.* Kor.
Germanujo. G. Harth, Wittelsbacheröhe 18, II, (13b) *Straubing.*
Germanujo. H. Tietz, Bremerstr. 15., (23) *Bremen.* Kor.
Greklando. Markos Budakis, Patision 88, *Atine.* Komerc. PM.
Italujo. Ugo Melegoni, Via Cerva 6., *Milano.* Kor.
Japanujo. Saka Tadashi, Otobe-motomachi 394., *Tsu-mie-ken.*
Japanujo. Mamora Maeta, Kohama 244., *Aomori, Okidate.* Kor.
Japanujo. Shigeo Matsumoto, Eiwa I-52, *Husesi Osaka.* Kor.
Japanujo. Esp. Grupo, Murakami Lernejo, *Murakami, Niigata-Ken.*
Japanujo. T. Shibata, 417 Wakatake-machi, Higashiyama-ku, *Kyoto.*
Japanujo. S. Minami, Maenoheta 1399, Hanaoka, Matusaka, *Mie-ken.*
Japanujo. Takeshi Inoue, Miyoshi-cho 3-13, Fukagawa, *Tokyo.*
Japanujo. Kunio Naruse, Kameoka, *Kyoto.* Kor.
Japanujo. Sakamoto-Noricy, Sengari 35-2, HuruKawa, *Aomori.*
Japanujo. Ito Ŝuzo, ĉe Ito Masaji, 92 Matsumotocho, *Kanazawashi.*
Japanujo. Yonemi Maeda, Komatubara, 6., *Kakayama-Si.* Kor., PM.
Japanujo. Matumoto Ken'iti, 2431 Kugoo, *Yokosuka.* PM., il PK.
Japanujo. Sugaja Ŝooji, 579 Ŝohana, *Tojama-ken.* Kor.
Japanujo. M. Otsuka, 4 Kaminosima, Minogo, Nakakawati, *Osaka.*
Japanujo. Yoshitaka Ueda, Kaizu-Kyoku, *Sbigaken.* Kor.
Urugvajio. Helios Tato, Gobernador del Pino 3860., *Montevideo.*

IMPORTO EL DANUJO. Ĉu vi deziras importi varojn el Danujo? Indiku al ni viajn dezirojn, kaj ni havigos al vi la deziritajn artiklojn. *V. Fich & Co., Kopenhago-Brb., Korsager Alle 62, Danujo.*

BOOKS! BOOKS! BOOKS! BOOKS!

NOTE, that when you buy books from the *Esperanto Association of North America*, all profits are used to give you a better magazine and a better Central Office for E.A.N.A.

"Universala Esperanto Metodo" by Dr. Wm. S. Benson

This great Esperanto book is again available. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Pronunciation of Esperanto alphabet and table of correlatives in 36 languages. Wonderful picture-method of instruction and definition. Complete textbook, reader, dictionary — also *krestomatio* of fables, stories, humor, etc., all profusely illustrated — complete picture-dictionary in Esperanto, with most common words given in 40 languages. Encyclopedic and unique. Large volume, beautifully cloth bound, stamped in gold, 560 pp., all for \$6.00 (members *deduct* 10% up to February; i.e. send \$5.40 now).

"The World's Chief Languages" by Dr. Mario A. Pei

Famous guide to the languages of the entire world, incl. *ESPERANTO*. Formerly titled "*Languages for War and Peace*." New 3rd edition. Full grammatical surveys of world's great languages, with vocabularies — also alphabets and illustrations of the lesser languages, incl. many strange native tongues; and language history with linguistic maps — all written in interesting and easy-to-understand style. Text and vocabulary equivalents in English. A reliable guide for every student of language and languages. Big cloth volume, 663 pp., price \$6.00 (members *deduct* 10% up to February; i.e. send \$5.40 now).

THE LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

ORDER YOUR LINGUAPHONE FROM E.A.N.A.

You can learn *ESPERANTO*, or any of 27 other languages, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through E.A.N.A. for benefits to both yourself and your Central Office.

The regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$50. Special favorable arrangements for Members, Teachers and Clubs. Also *Canadian Members* will likewise receive favorable arrangements, and pay in Canada to Canadian agency without customs duty, etc. Write to us for details of our special *Linguaphone* offers.

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.

10% OFF THESE IMPORTANT BOOKS

Discount Valid to February 1—Members Only

Books of great value to our movement, not only for high quality as Esperanto literature but also because they are published by official departments of the Brazil Government. These two quite different volumes serve as irrefutable answers to the question: "Do important organizations and governments use Esperanto?" They should be in every Esperantist's library.

"Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo"

Entirely in Esperanto. Selections of articles published by the official Brazilian National Council of Geography. Beautiful volume on the life, customs, and country of Brazil (the Amazon, jungles, gauchos, natives, wondrous plants, diamond-hunters, etc.) Richly illustrated with 37 large full-page art engravings, suitable for exhibit or framing. Best coated paper, 152 pp, large format 7" x 10½". A *must* for every Esperantist's library. While present stocks last you may choose as follows: Art-card covers \$2.50; card panels over leatherette \$3.25; leatherette stamped in gold \$4.00; postpaid. (*Deduct 10%*).

"Statistika Resumo pri Brazilo"

All material in 3 languages: English, Portuguese, and Esperanto. A large and impressive book of Brazil statistics with full indices, by the official Institute of Geography and Statistics. Physiography, demography, economy, social welfare, culture, administration (with divisions in great detail). The full listing of terms in all fields, makes it a real contribution to Esperanto terminology (with English and Portuguese equivalents). A purely statistical and scientific production, with preface, indices and chart. 267 pp (nearly an inch thick), large format 7¼" x 10½", bound in strong flexible card covers. While they last, \$3.00 postpaid. (*Deduct 10%* — i.e. \$2.70.).

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.